

La Laborista Esperantisto Arbetar-Esperantisten

Nr 2 | juni 2016

N-ro 2 | junio 2016

Tvåspråkig tidning utgiven av SLEA | Dulingva gazeto eldonita de SLEA



SAT 2016

Herzberg am Harz
kongreso Germanio

Innehåll | Enhavo

Årsmötesrapport

SAT-kongreso 2016

Novaĵoj de libroservo

Vad är Pasporta Servo?

Intervjuo kun Rhodi Mellek

Arbetar-Esperantisten är en tvåspråkig tidning på svenska och esperanto som ges ut av Svenska arbetaresperantoförbundet. Tidningen drivs helt ideellt.

La Laborista Esperantisto estas dulingva (sveda-Esperanto) membrogazeto de Sveda Laborista Esperanto-Asocio. La gazeto estas krea kaj eldonata tute senprofiteme.

Redaktionen / La redakcio:

Daniel Sandgren
Marcus Hansson

Retejo:

www.slea.se

Retpoŝto:

arbetaresperantisten@hotmail.com

La estraro de SLEA:

Prezidanto: Daniel Sandgren

Sekretario: Guy Coste

Kasisto: Marcus Hansson

Ceteraj estraranoj:

Soile Lingman

Inga Johansson

SAT-perantino / SAT-kontakt:

Inga Johansson

Retpoŝto: ishim@hotmail.com



541-826

Svanmärkt trycksak
LaserTryck.se

Enhavo

sida / paĝo

• Gazeta informo	2
• Ledare / Redaktangulo	3
• Kio estas Pasporta Servo?	4
• Vad är Pasporta Servo?	5
• Intervjuo kun Rhodi Mellek	6
• Årsmötesrapport	9
• Arestadoj en la lokalo de CNT (Lillo)	10
• Unua de majo en Borlänge	11
• SAT-kongreso 2016	12
• Anslut dig till arbetaresperantisterna	14
• Novaĵoj de libroservo	15
• Lär dig esperanto!	16

Redaktionen vill tacka alla som på något sätt bidragit till detta nummer och de som under året skänkt pengar till förbundet!

**LASTA DATO POR LA
MANUSKRIPTOJ AL LA SEKVONTA
ELDONO ESTAS 2016-06-30.**

**SISTA DATUM ATT SKICKA IN
TEXTER TILL KOMMANDE NUMMER
ÄR 2016-06-30.**

Aper-plano 2016

marto, junio, aŭgusto, novembro

Adreso de SLEA:

Svenska ArbetarEsperantoFörbundet
Box 64
563 22 Gränna
Sverige / Svedio

Ledare

Vi kan med glädje meddela att SLEA kommer ge ut en ny bok under året. På årsmötet i mars beslutades att vi kommer översätta och ge ut *Kallskänken* av Jenny Wrangborg. Du kan läsa mer om detta i årsmötesrapporten från mötet i Stockholm. Du kan även läsa om *Pasporta Servo*, tjänsten som gör det möjligt att resa världen över och övernatta utan kostnad hos andra esperantister. Vi har även publicerat en intervju med Rhodi Mellek från *Partiya Yekîtiya Demokrat (PYD)* ett politiskt parti grundat av kurdiska aktivister. I sommar arrangeras årets SAT-kongress i Tyskland, närmare bestämt i esperanto-staden Herzberg am Harz. Om detta kan du läsa på sidan 12. I slutet finner ni en kortare text om polisrepression mot facket CNT i Lille samt en rapport från händelserna som utspelade sig under första maj i Borlänge. I slutet hittar du även den senast inkomna litteraturen som SLEA distribuerar. Vi avslutar med att uppmana alla att försöka värva nya medlemmar.

Vi vill också önska er alla en glad sommar!

Redaktangulo

Ĝoje ni povas komuniki ke SLEA el-donos novan libron dum la jaro. Dum la jarkunveno en marto ni decidis traduki kaj eldoni la libron *Kallskänken* de Jenny Wrangborg. Vi povas legi pli pri ĉi tio en la jarkunvena raporto de Stokholmo. Vi povas ankaŭ legi pri *Pasporta Servo*, la servo kiu donas eblecon vojaĝi tutmonde kaj tranokti senpage ĉe esperantistoj. Ni ankaŭ publikigas intervjuon kun Rhodi Mellek, reprezentanto de PUD en Bruselo. PUD estas politika partio fondita de kurdaj aktivuloj. Ĉi somere la SAT-kongreso okazos en Germanio, en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz. Pri tio oni povas legi en paĝo 12. En la fino vi trovas etan tekston pri polica subpremo kontraŭ la sindikato CNT en Lillo kaj raporto de okazintaĵoj dum la Unua de majo en Borlänge. En la fino vi ankaŭ trovas novaĵojn de libroservo de SLEA. Ni finas per la instigo ke ĉiuj klopodu varbi novajn membrojn.

Ni ankaŭ deziras al vi ĉiuj agrablan someron!

JARKOTIZO | MEDLEMSAVGIFT

- Unuopa membro/Enskild medlem 100:-
- Familia membro/Familjemedlem 30:-
- Ungdomar upp till 20 år, arbetslösa, studerande och pensionärer 80:-
- Stödmedlemskap för organisationer 200:-

Membriĝu / Bli medlem!

Plusgiro 5 31 60 - 8.

(Sv.Arbeta.Esperanto-förb.)



Atentu!

Pri la enhavo de La Laborista Esperantisto respondas la kontribuintoj mem.

Uppmärksamma!

Skribenterna ansvarar själva för sina texter. Det är alltså inte nödvändigtvis SLEAs åsikter som presenteras.



Trovu loĝejon ĉie ajn sur la planedo

Kio estas Pasporta Servo?

Pasporta Servo estas adresaro de homoj el la tuta mondo, kiuj senpage akceptas gastojn en siaj hejmoj. Por tio, la gasto(j) kaj la gastiganto(j) devas nur scipovi Esperanton.

Pasporta Servo estas servo de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo). Ĝiaj celoj estas faciligi vojaĝadon al esperantistoj, kaj tiel helpi al la starigo de kontaktoj trans limoj de lingvoj, kulturoj kaj generacioj.

La adreslibro estas eldonita de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kiu dum 2011 enhavis 1089 gastigantojn el 90 landoj. La retpaĝa versio 3.0 dum 2015 ricevis 2000 mil novajn uzantojn.

La gastigantoj indikas la kondiĉojn, ekz-e pri nefumado, aŭ la nombro de gastoj aŭ tranoktoj, kaj povas menciigi diversajn komentojn pri siaj intereso, deziroj, atingebleco kaj simile. Gastigantoj ĝuas akcepti homojn el diversaj landoj, gastoj ĝuas senpagan restadon, kaj ili facile interkomunikas per Pasporta Servo. Ofte, gastigantoj helpas al gastoj pri transportado, ekkoni la lokon, ktp.

La unua ideo pri la tiel nomata "Programo Pasporto" aperis en 1966, kaj estis propono de Ruben Feldman-Gonzalez el Argentino. Pasporta Servo laŭ la nuna sistemo aperis unuafoje en 1974, kun 40 gastigantoj, sub gvido de Jeanne-Marie Cash el Francio. Ambaŭ pioniroj daŭre estas gastigantoj de Pasporta Servo.

Pli pri Pasporta Servo kaj la kondiĉoj oni trovas ĉe:
<https://pasportaservo.org/>

Fontoj:

<https://pasportaservo.org/>

https://eo.wikipedia.org/wiki/Pasporta_Servo

<https://www.facebook.com/pasportaservo/>



Hitta boende var som helst på planeten

Vad är Pasporta Servo?

Pasporta Servo (ordagrant översatt ”en passtjänst”) är en gästfrihetstjänst för esperantister. Med hjälp av denna kan esperantister utan kostnad övernatta hos andra esperantister över större delen av världen.

Tjänsten administreras av TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo / Världsesperantoförbundet för ungdomar) med syftet att underlätta esperantisters resande och att hjälpa till att upprätta kontakter över språk-, kultur-, och generationsgränser.

Adressboken ges ut av TEJO och finns numera både som fysik bok samt som nätbaserad version på hemsidan pasportaservo.org. Den fysiska adressboken bestod 2011 av 1089 värdar från 90 länder. Den senaste nätbaserade versionen 3.0 fick under 2015 över 2000 nya användare.

Minimikravet för att använda tjänsten är att både gästen och värden talar esperanto. Värden anger villkoren, exempelvis antal gäster, antal övernattningar osv. Värden kan också nämna egna intressen och eventuella andra önskemål. Ofta hjälper värdarna gästerna med transport och underlättar närvaron med hjälp av sin lokalkännedom. Med hjälp av esperanto och Pasporta Servo kommunicerar man lätt med varandra och kan alltså resa och övernatta utan kostnad över stora delar av världen.

Pasporta Servo i sin nuvarande form dök upp 1974 med 40 värdar under ledning av Jeanne-Marie Cash från Frankrike. ”Programo Pasporto” är en föregångare som dök upp redan 1966 efter förslag av Ruben Feldman-Gonzalez från Argentina. Båda är pionjärer som bovärdar inom Pasporta Servo.

Mer information om Pasporta Servo och dess villkor går att finna här:
<https://pasportaservo.org/>

Källor:

<https://pasportaservo.org/>

https://eo.wikipedia.org/wiki/Pasporta_Servo

<https://www.facebook.com/pasportaservo/>

Pasporta Servo

Intervjuo kun Rhodi Mellek reprezentanto de la PUD en Bruselo.



“ NI DEVAS PROTEKTI LA BONAĴOJN KIUJN LA REVOLUCIO ALPORTIS AL LA KURDOJ.”

- Rhodi Mellek. Reprezentanto de la PUD (1) en Bruselo.

Mellek kredas je la socia projekto, kiun la kurdoj starigis en la nordo de Sirio, kaj opinias, ke ĝi povas esti efika por pacigi la landon. “Ne estas ideo pri ŝtato, la popoloj memmastrumas sin”.

“Mirindas, ke io tia naskiĝas el milito.” Post jardekoj de subpremado Roĵavo vidis la lumon, kvankam ankoraŭ ĝi troviĝas tutmeze de milito. La siriaj kurdoj regas sian teritorion kaj fondis “progreseman, demokratan kaj egalecan socion”, laŭ la vortoj de Rhodi Mellek (Kandli, Kurdio, 1978). Ŝi estas la reprezentanto de la PUD(1) en Bruselo kaj membro de la ina movado MLI-S(2). Ŝi vizitis Eŭskion dum la lastaj tagoj, invitita de la Eŭska PEN-Klubo okaze de la Tago de la Gepatra Lingvo. Si bedaŭras, ke Okcidento subtenis la islamistojn dum la packonferenco de Ĝenevo. “Ĉu tiuj devas solvi la sirian aferon?”

Ĉu vi havas esperon rilate la batalhalton?

Ĝi povas esti bona komenco, kial ne? Sed -oni devos vidi... Iuj provas profiti por ataki. Ni havas la rajton je memdefendo, kaj se oni eniros la kurdan teritorion, ni nin defendos.

Baŝar al-Asad kunvokis baloton. Ĉu la PUD pretas partopreni?

Eble iuj kurdoj ĉeestos, sed mi ne kredas ke la PUD partoprenos.

Pasintan semajnon la LFK(3) agnoskis sian respondecon rilate la atencon en Ankaro. Tamen, la prezidento de Turkio Recep Tayyip Erdogan obstinas aserti, ke la farintoj estas siriaj kurdoj.

Erdogan faros kion ajn, por ke la kurdoj ne kontrolu lian sudan landlimon, por daŭrigi

provizi per armiloj la IŜ-on kaj aliajn ĝihadismajn grupojn. Ian ajn ekskuzon li serĉos por enmiksiĝi en la landajn aferojn kaj ne haltos. Turkio agas fripone.

Dum longa tempo vi suferis persekutadon flanke de la siria registaro. Sed lastatempe oni povus trovi paralelecon inter la movoj de la kurdaĵ milicoj kaj la siria armeo. Ĉu ŝanĝiĝis la rilato kun la registaro?

Dum jaroj la kurdoj estis subpremataj. Niajn lingvon kaj ĉiujn aliajn kulturajn esprimojn oni malpermesis al ni. Ne nur en Sirio, ankaŭ en aliaj landoj oni klopodis malaperigi la historion de la kurdoj. En Sirio la familio al-Asad kruele punis la kurdojn. Komence de la milito la armeo retiriĝis el nia teritorio, ĉar ĝi ne volis malfermi alian fronton. Speciala estas la rilato inter la kurdoj kaj la registaro, sed ni ne estas aliancanoj. Ni ŝatas nek la registaron, nek la Islaman Ŝtaton. Ni havas nian politikan projekton kaj ni volas nenion komunan kun ili.

Baŝar al-Asad estas dirinta ke li pretus agnoski aŭtonomecon al la kurdoj.

Nemiam mi fidis la vorton de Baŝar al-Asad, kaj neniam mi fidis ĝin.

Oni ne povas scii kiel finos la milito. Kio estos pli bona por la kurdoj, la venko de al-Asad aŭ tio, ke la ribelantoj kaptu la povon?

Ni prioritigas politikan solvon por tuta Sirio. Baŝar devas foriri, sed iel ajn ni devas eviti, ke la islamistoj kaptu la povon. Kiel eble plej baldaŭ la milito devas finiĝi, ĉar estas pli kaj pli da mortintoj kaj rifuĝintoj, kaj Turkio uzas ilin por ĉantaĝi. Oni forprenis ilian homecon kaj ŝanĝis ilin en marĉandilon. Estas hontinde.

Ĉu kunigi la kantonojn de Afrino(4) kaj Kobano estas celo de la kurdoj?

Kompreneble. Kial? Ĉar estas tre strategia loko. El Turkio la IŜ ricevas helpon kaj ĝihadistojn. Afrino estas izolita kaj riskas esti sufokita. Logikas doni kontinuecon al la teritorioj de la kurdoj.

Sed en tiu terpeco la kurdoj ne estas majoritato. Ĉu ne estus danĝere por la PPT(5)-milicoj?

Ni ne trudos niajn flagon nek lingvon al iu ajn. Ĉiuj havas lokon en nia socia projekto. Ni batalas por la homeco kaj la demokratio.

En la okcidentaj amaskomunikiloj ofte oni aŭdas la vortojn “moderaj ribeluloj”. Kontraŭ kiuj batalas la kurdoj en la urbo Azaz?

Ĉiuj estas branĉoj de al-Kaida. Simple ili ŝanĝas sian nomon. Aliflanke, la PPT estas en la Demokrata Siria Konsilio- kune batalante kun asirianoj kaj araboj.

La siriaj kurdoj havas rilaton kun Usono kaj Rusio. Ĉu eblos gardi tiun ekvilibron dum longa tempo?

Ŝajnas al mi ke ne, ĉar la strategio de Usono malklaras. Ne estas, ke ambaŭ potencoj amas la kurdojn, sed temas pri iliaj politikaj kaj strategiaj interesoj. Ili helpas armee, sed ne subtenas la socian projekton.

Al la Packonferenco de Ĝenevo oni ne invitis la kurdojn, laŭ la peto de Turkio.

Okcidento subtenis la islamistojn en Ĝenevo. Ĉu tiuj devas solvi la sirian aferon? Tamen nin oni ekskludis. Hipokriteco estas en Ĝenevo.

Kion vi opinias pri la armea interveno de Rusio? Ĝi rompis la militan ekvilibron.

Se la islamistoj estas ĝia celo, bone ŝajnas al mi, sed al mi ne plaĉas, kiam ĝi mortigas civilulojn. Mi estas por la pacigado. Estas malsameco inter la kurdaĵoj kaj la ceteraj. La niaj estas memdefendaj milicoj. Nian projekton ili protektas kontraŭ tiuj, kiuj trudeniras nian teritorion.

La siriaj kurdoj estis devigitaj batali, sed nun vi kontrolas vian teritorion. Vi demonstris ke en Mezoriento eblas alia socia modelo.

La revolucio en norda Sirio kunportis bonaĵojn al ni, kaj ilin ni devas protekti. Kune kun la proklamo de niaj teritorio kaj rajtoj, ni disvolvis socian projekton por protekti la civitanojn fronte al ĉiu ajn perforto. Ĝi venis post pedagogia kaj revolucia laboro: la civitanoj, inoj kaj viroj je la sama nivelo, politikigis por lukti flanke de la kurdaĵoj kaj lingvo. Ĉiu vilaĝo memmastrumas sin; ne ekzistas la ideo pri ŝtato. La kvartaloj, la vilaĝoj, la kunvenoj... fine la homoj administras la ĉiutagaĵojn, ne estas ŝtato. Duono de la kunvenoj estas viroj, kaj la alia duono estas inoj.

Kiun rolon plenumas la inoj en la socio?

La rajtoj de la inoj estas eksterordinare gravaj por ni. La ino vivas koloniigita, kaj tion ni volas frakasi. La ino estas en la mezo de la socio por ni. Dum la sieĝo de Kobano oni vidis tion; ŝi estis en la unua linio de la milita kampo. Jen kontraŭ la IS jen kontraŭ la vidpunkto de la masklisma kaj feŭda diktaturo.

Sirio estas plureca lando. Kiun lokon havas la ceteraj etnoj en tiu ĉi socia projekto?

Jes, Sirio estas mozaiko: araboj, asirianoj, kurdoj, alavitoj, ŝijaistoj... Ni ne volas alian civilan militon en nia teritorio. Reprezentantoj de ĉiuj etnoj partoprenas en niaj kunvenoj, kaj ĉiuj lingvoj estas protektataj.

Vi havas fortan rilaton kun la PDP(6) de Norda Kurdio(7), sed kia estas via rilato kun la RKR(8) de Suda Kurdio(9)?

En Irako oni vivas laŭ feŭda sistemo; estas pli kaj pli da moskeoj kaj ili estas ege pli islamigitaj. Oni estas pli proksime de la ankara politiko, de la PJD(10). Ankaro investis en multajn projektojn, kaj por ili ĝi estas ĉefurbo. La projekto de Barzani ne estas demokrata. Kontraŭe, Abdullah Öcalan por ni estas gvidanto, filozofo.

Notoj (Nomoj en la kurda lingvo krom la indikitaj):


- (1) Partio de la Unio Demokrata (PUD)/Partiya Yekîtiya Demokrat (PYD).
- (2) Movado de la Liberaj Inoj-Stelo (MLI-S)/Yekîneyên Jinên Azad-Star (YJA-Star).
- (3) Liberigaj Falkoj de Kurdio (LFK)/Teyrênbazê Azadiya Kurdistan (TAK).
- (4) Afrino-Efrîn.
- (5) Popolaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Gel). Inaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Jinê).
- (6) Partio Demokrata de la Popolo (PDP)/Partiya Demokratik a Gelan (PDG). Halklarin Demokratik Partisi (HDP), en la turka.
- (7) Norda Kurdio/Bakurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la Turka ŝtato.
- (8) Regiona Kurda Registaro (RKR)/Hikumetî Herêmî Kurdistan (HHK/KRG).
- (9) Suda Kurdio/Bashurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la Iraka ŝtato.
- (10) Partio de la Justeco kaj la Disvolviĝo (PJD)/Adalet ve Kalkinma Partisi (AKP), en la turka.

KLARIGOJ:

Intervjuo de Adrian Garcia (Bilbo) originale aperinta en la eŭska ĵurnalo Berria la 27-an de Februaro 2016-a.

Tradukis: NXC. Aprilo 2016-a.

Provlegis: DS kaj AA.




Den 12 mars höll SLEA sitt årsmöte på Esperanto-Centro i Stockholm med 11 deltagande medlemmar. Beslut togs på att även i år ge ut en bok. Den här gången blir det en översättning av Jenny Wrangborgs diktsamling Kallskänken. Esperantoversionen beräknas vara ute någon gång under sommaren.

Jenny Wrangborg har för övrigt nyligen blivit vald till ordförande i Föreningen Arbetarskrivare. Gunnar Gällmo kommer jobba med översättningen och Jan Setréus kommer ansvara för korrekturläsningen.

I övrigt så kör vi på med en värvningskampanj och hoppas alla medlemmar försöker tipsa andra esperantister och intresserade i sin närhet som kan tänkas vilja gå med i SLEA och samtidigt få en bok på köpet!

Årsmötet 2017 kommer även det att hållas i Stockholm men då på Arbetarrörelsens Arkiv och Bibliotek. Vår medlem Lars Gogman som arbetar där kom visa oss runt i arkivet och presentera SLEAs arkivmaterial.



Francio: du arestadoj en la lokalo de la sindikato CNT (Lillo) estigas polemikon



Foto: Pierre Le Masson

2016-04-20

Manifestacio subtene al la du personoj arestitaj, okazis antaŭ la policejo de Sud-Lillo.

La sekvo de la manifestacio kontraŭ la El-Khomri-leĝo estis tumulta ĉi merkredon posttagmeze en Lillo. Du personoj estis arestitaj el la lokalo de la Nacia Konfederacio de la Laboro, kiu denuncas la perforton de la enrompo.

Laŭ la polico, revene de la mobilizado kontraŭ la Labor-leĝo, « *individuoj kulpis pri perforto kontraŭ kvin policistoj, apud la lokalo de la CNT (Nacia Konfederacio de la Laboro), strato Arras, en kiu ili rifuĝis. Ni petis de ili, ke ili foriru, sed ili rifuzis* ». La policistoj poste enrompis la pordon de la konstruaĵo kaj arestis du personojn.

Subtena manifestacio

Thomas Barrier, regiona sekretario de la CNT, denuncas tiun okazaĵon. « *Tio estas konsterna, temas pri sindikata lokalo ! La policistoj traserĉis kaj renversis ĉion, kio estis en la ĉambro. Tiu agado estis perforta* ». Gazetkomunikaĵo kun pli da reagoj estis diskonigita fine de la posttagmezo.

La du personoj arestitaj estis detenitaj pro perforto kontraŭ personoj, posedantoj de publika aŭtoritato. Subtena manifestacio okazis antaŭ la policejo de Sud-Lillo.

Fonto:

Ĉi tiu teksto aperigis (2016-04-23) ĉe la retpaĝo:
<http://neniammilitointerni.over-blog.com/>

Svedio:
sola fronte al 300
novnazioj, ŝi levas la
pugnon kaj fariĝas
heroino.

Foto: David Lagerlöf

2016-05-01

Svedino ne hezitis esprimi sian opozicion fronte al 300 novnazioj dum manifestacio en Borlänge, Svedio. Ŝia gesto estis salutata de la tutmonda interretanaro.

« *Ili ne timigas min* » asertis Tess Asplund al la lokaj gazetoj. Levante la pugnon fronte al kolektiĝo de 300 novnazioj, la 42-jaraĝa virino elmontris ekzemplan kuraĝon. Dum la movado memproklamita Nordiska motståndsrörelsen (Norda movado de Rezistado), ekstremdekstra organizaĵo, manifestaciis en Borlänge, urbo centre de Svedio, Tess Asplund kontraŭstaris per simbola gesto.

« Milito de la rigardoj »

La fotisto David Lagerlöf, kiu fotis ĝin, indikis en sia Fejsbuka paĝo, ke Tess Asplund troviĝis « *sola fronte al la plej perforta nazia organizaĵo de Svedio* ». « *Kion ŝi pensis?* » estas la unua demando, kiun mi starigis al mi, kiam mi estis fotonta. La ĉefoj de la organizaĵo proksimiĝis al ŝi en solena silento. La rigardo de la virino krucigis tiun de la ĉefo, kiu ne deturniĝis. Okazis mallonga "milito de la rigardoj" ĝis interveno de la polico. »

Intervjuita de P4 Dalarna, sveda retpaĝaro, ŝi tamen esprimis, kvankam fariĝonta simbolo, sian grandan surprizon koncerne la eĥon, kiun havis la foto en la amaskomunikiloj. « *Mi kutimas iri al manifestacioj, tio ne estas nova por mi, ŝi diris al la novaĵretejo. Mi nur sentis, ke ili paŝas por komprenigi al mi, ke mi ne rajtas esti ĉi tie. Unu el ili, fiksrigardis min, ankaŭ mi rigardis lin en la okuloj. Li nenion diris, ankaŭ mi silentis. Poste la polico alvenis kaj forpuŝis min el la vojo.* »

Fonto:

Ĉi tiu teksto aperigis (2016-05-05) ĉe la retpaĝo:
<http://neniammilitointerni.over-blog.com/>

Datoj: 16-23 julio 2016, semajnon antaŭ UK en Nitra, Slovakio, do eblas kombini la partoprenon en ambaŭ kongresoj kaj laŭ deziro pluveturi al Slovakio. Se estas intereso, OKK (Organiza Kongresa Komitato) provos helpi, konsili por trovi taŭgan vetureblon.



Loko: En Sieber, alloga urboparto de Herzberg am Harz (ekde 2006 oficiale: la Esperanto-urbo), en idilie bela valo en la Harz-montaro, meze de Germanio.

Kongresejo: Komunuma kulturcentro de la vilaĝo kun podio kaj bufedo, kapabla akcepti 100-150 personojn. Krome uzeblas klasĉambroj de proksima lernejo. Ĉio en Sieber estas facile atingebla piedirante, ankaŭ aliro al arbaraj promenoj.

Atingeblo: Herzberg am Harz de ĉiuj grandurbaj flughavenoj (ekz. Frankfurt, Dortmund, Berlin, Hamburg, Hannover, Leipzig) estas facile atingebla per trajno en ĉ. 3-4 horoj; ene de Eŭropo kaj en Germanio el ĉiu direktoj per oftaj rapidtrajnoj (IC, ICE).

Kotizoj: Malaltaj, kaj eĉ estas pluraj rabatkategorioj. Kotiztabelo estas sub la menupunkto *Aliĝilo* en la retpaĝo <http://sat89.esperanto-urbo.de/>. Loĝado, manĝado, ekskursoj kaj aliaj servoj pagendas aparte kaj prezoj estas same en la reta aliĝilo.

Loĝado: Ĉefe en la 3-stela kongreshotelo Zum Pass, kiu estas Esperanto-hotelo kaj restoracio. Estas elektebla ankaŭ ĉambro en la komforta feriodomo Haus Diana, kie al ĉ. 25 frualiĝintoj ni povos certigi 2-3-litajn apartamentojn kun matenmanĝo. Malfrualiĝintoj povos laŭ individua peto al OKK peti serĉadon de ĉambro en aliaj feriodomoj en Sieber. Ĉiuj tranoktejoj estas en mallonga promendistanco de la konferencejo. Detalojn vidu sub menupunkto *Tranoktado, manĝoj* (<http://sat89.esperanto-urbo.de/>).

Manĝado: La matenmanĝo okazos en la du menciitaj tranoktejoj kaj estas en la hotelprezoj. Tranoktatoj sen matenmanĝo povos aparte pagi por ricevi matenmanĝon en la kongres-tranoktejoj por ĉ. 5-7 EUR/persono/tago. Tagmanĝi kaj vespermanĝi eblas en la Esperanto-hotelo kaj restoracio Zum Pass (loko por ĉ. 80 personoj, esperantlingva menukarto) aŭ en la eta restoracio Dachstübchen.

Pli da informo kaj reta aliĝilo oni trovas ĉe:
<http://sat89.esperanto-urbo.de>



Herzberg am Harz


Esperanto-urbo | Esperantostaden



Anslut dig till arbetaresperantisterna. Bli medlem i SLEA idag!

ERBJUDANDE!

Teckna ett medlemskap i SLEA för 100 kr så får du förutom vår tidning, Arbetar-Esperantisten 4 ggr/år, en bok på köpet. Välj en av följande böcker:




La Korto (en vittnesskildring om ett modernt statarsystem, mitt ibland oss, på esperanto) av Kristian Lundberg

Esperanto Direkt (lärobok för nybörjare, svenska-esperanto) av Stano Marček.

Erbjudandet gäller alla nya medlemmar t.o.m. 2016-12-31.

Betala in din medlemsavgift på följande plusgiro:
5 31 60 - 8 (Sv.Arbetar.Esperanto-förb.)

Kontakta oss: arbetaresperantisten@hotmail.com



SAT-kotizo 2016 | SAT-avgift 2016

Pagu vian SAT-kotizon al plusgiro de SLEA 5 31 60 -8

2016 Plena kotizo SEK 535:-

2016 Duona kotizo SEK 285:- (senlaboruloj, familianoj, emeritoj kaj junuloj)

Novaĵoj de libroservo de SLEA

Libroj




Paradizo ŝtelita

- Trevor Steele

Originala romano okupiĝanta pri la sorto de la lastaj aborigenoj sur la aŭstralia insulo Tasmanio.

Eldoninto: FEL

Prezo: 190 kr



Flugoranĝo rakontas

- Johan kaj Andreas Galtung

Kolorilustrita rakonto pri fluganta oranĝo, kiu vojaĝas tra la mondo kaj observas kiel kondutas la homoj.

Eldoninto: Eldona Societo Esperanto | Esperantoförlaget

Prezo: 100 kr

Por pli da informo vizitu www.slea.se | För mer information besök www.slea.se

Sendu mendojn al la retpoŝtadreso aŭ al la adreso de SLEA sube:
Beställningar skickas till epostadressen eller postboxen nedan:

Retpoŝto:

slea.smolando@hotmail.com

Adreso de SLEA:

Svenska ArbetarEsperantoFörbundet
Box 64
563 22 Gränna
Sverige / Svedio

Afrankoj aldoniĝas je sendo
de libroj/broŝuroj.

Plusgiro: 53160-8
(Sv.Arbet.Esperanto.förb.)

LÄR DIG ESPERANTO!

Esperanto är ett planspråk vars främsta syfte är att underlätta kommunikationen för människor med olika språkbakgrund. Detta "brospråk" är relativt lätt att lära sig på grund av sin regelbundenhet och flexibilitet. Då esperanto inte tillhör någon nation eller något folk är det även mer rättvist att använda än de nationella språken.

ETT FUNGERANDE SPRÅK!

Ett språk dugligt för alla ändamål kan endast uppkomma ur en kollektiv process. Esperanto tillhör och formas av sina användare. Esperanto har använts i över 100 år och används idag i växande omfattning på internet. Dess användare finns idag i hela världen.

FÖR DEMOKRATISK KOMMUNIKATION!

Alla som har erfarenhet av internationell kommunikation vet att språket kan vara ett hinder, men med hjälp av esperanto kan vi umgås som jämlikar.

GÅ MED I SLEA!

Svenska arbetaresperantoförbundet, SLEA (Sveda Laborista Esperanto-Asocio), arbetar för att sprida det internationella språket esperanto inom arbetarrörelsen och bland dess sympatisörer.

Svenska ArbetarEsperantoFörbundet
Sveda Laborista Esperanto-Asocio

Box 64
563 22 Gränna
Sverige | Svedio

